THE BRITISH ESPERANTIST

OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Inc.)

ISSUED ON THE 15TH OF EACH MONTH.

SUPPLIED TO MEMBERS ONLY.

Vol. XXIV.-No. 285.

DECEMBER, 1928.

THE

BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION

(INCORPORATED).

142 HIGH HOLBORN, LONDON, W.C.1.

Telephone: Holborn 4794.

Telegrams: "Esperanto", Westcent, London.

Late Hon. President: DR. L. L. ZAMENHOF.

Hon. President: J. M. WARDEN.

President: JOHN MERCHANT.

Hon. Vice-Presidents: G. D. BUCHANAN, MISS E.

A. LAWRENCE.

Vice-Presidents: J. J. BOUTWOOD, J.P., PROF. W.

E. COLLINSON, M.A., Ph.D., W. HARVEY, I.S.O.

Hon. Secretary: ROBERT ROBERTSON.

Hon. Treasurer: CHARLES A. FAIRMAN.

Secretary: Montagu C. Butler, L.R.A.M.

Business Manager: CECIL C. GOLDSMITH, F.C.I.

Office Hours: 9-5.30. (Monday till 8.30, Saturday till 12.30).

The Association consists of Fellows Members, Associates, Affiliated Groups and Federations. The Annual Subscriptions are: — Fellows, 21s.; Members, 5/-; Associates, 2s. 6d.: Life Fellowship, £12:12:0; Life Membership £5

A list of Affiliated Federations and Groups will be sent on application. Group Affiliation fee: 6d. per member per annum; minimum, 5/-.

This Official Organ is sent each month to Fellows and Members.

"INTERNATIONAL LANGUAGE."—A monthly magazine in English, devoted to the study of the International Language problem. Includes instructional articles on Esperanto and The Esperanto Student, a supplement for beginners. Subscription, 2/6 per annum, post free.

INTERNATIONAL HOLIDAYS.

B.E.A. ARRANGEMENTS FOR 1929.

After the successful caravan to Antwerp this year we are arranging others for next summer, but as the parties will not be so large, of course special trains and ships are out of the question. Every arrangement possible will be made for the comfort of those taking part, and remembering the rough sea on the journey to Antwerp, it has been deemed advisable to make the Clerk of the Weather a life member, on condition that he arranges smooth passages in all of the following cases.

The big event of the year is the

UNIVERSAL CONGRESS IN BUDAPEST,

and every Esperantist who can afford the time and money necessary should make a point of attending. The Congress is from Friday, August 2nd, to Friday, August 9th. The Congress fee is one pound, as usual, and "aligiloj" may now be obtained from the B.E.A. office.

Our caravan arrangements are as follow:—

Leave London (Victoria): 10 a.m., Wed.,

July 31st. Travelling via Dover, Ostend,

Cologne, Nuremberg.

Arrive Budapest: 6.20 a.m., Friday, August 2nd. At Brussels the Belgian party will join the train.

Through reserved compartments for the party from Ostend to Budapest.

Fares: First class throughout: £16:16:0 return.

Second class rail, saloon on steamer, £11:10:0 return.

Members of the party must travel together on the outward journey, but may return individually at any time within 30 days. Break of journey allowed when returning.

Charges for sleepers (Ostend-Budapest) are: first class £3:17:11, second class £3:1:3, each way.

Accommodation in Budapest: details not yet received, but will be announced as soon as possible.

Booking. A place in the Caravan may be reserved now on payment of a deposit of £1. The earlier you let us know of your intention to participate, the better arrangements can we make for your comfort.

OTHER HOLIDAY ARRANGEMENTS.

All who can should undoubtedly go to Budapest, but there are many who, owing to the expense or unsuitable date, cannot do so. For some of these we have arranged the following holidays.

HOLIDAY I: OOSTDUINKIRKE SUR MER Belgium, July 13th to 20th.

Accommodation in a large hotel, with annexes, for 100 Esperantists, of whom 40 will be British and 60 from various other countries. There will

be meetings, concerts, rambles, community singing, and a dance. Visits will be arranged, if desired, to Ypres and Bruges, at a small extra charge. Total cost from London, including fares, accommodation, and food: £4:7:6.

HOLIDAY II: in ROUEN, FRANCE, from July 27th to August 3rd.

Accommodation as in Holiday I (above). There will also be a whole day excursion on the river, and visits to one or two interesting works. If desired, a visit to Paris will be arranged, for which there will be an extra charge. Total cost from London, including fares, accommodation, food, river trip, etc: £5. If saloon on boat (Newhaven-Dieppe), both ways, 9/3 extra.

Important. It is certain to that there will be far more applicants for Holidays I and II than we can cater for, and it has therefore been decided that, as far as the British contingent is concerned, the whole of the places will be reserved for B.E.A. members, and that they will be allotted to the first applicants. Places may now be booked on payment of a deposit of £1.

Will those going who can help in the week's entertainment by speech, song, story, lecture, discussion, or playing a musical instrument, please give details when booking.

Tickets from the provinces to London at single fare and a third for the return journey will be issued in connection with all three parties.

C. C. Goldsmith, Business Manager,
British Esperanto Association,
142, High Holborn,
London, W.C.1.

ZAMENHOF BIRTHDAY CELEBRATIONS.

Members are reminded that the 15th of December is the anniversary of the birth of Zamenhof. It is now internationally agreed that the most practical way of showing our appreciation of his life and work is to purchase at least one Esperanto book on that date. We expect British Esperantists to be among the foremost to celebrate this Festo de la Libro in a fitting manner, and we hope that the rush of orders received may make it necessary to enlarge our forwarding staff for the week.

ANTVERPENA KONGRESO.

Pro diversaj malfacilaĵoj ĝis nun ne aperis la "Belga Antologio," sed la Franca parto estas preskaŭ preta, kaj la Komitato esperas dissendi ĝin antaŭ la fino de la jaro. La Flandran parton oni dissendos poste, tuj kiam ĝi estos preta.

La Kongresa Sekretario tre ŝatus ricevi donace fotografaĵojn faritajn dum la kongreso. Bonvole sendu ekzemplerojn al S-ro F. Schoofs, 11 Kleine Hondstraat, Antwerp, Belgium.

20th BRITISH ESPERANTO CONGRESS

COUNTY HALL, CANTERBURY. WHITSUNTIDE, 1929.

Patrons (First List).

H.R.H. The Duke of Connaught, K.G., His Worship The Mayor of Canterbury (Captain Vansittart Howard, D.S.O., R.N.), The Sheriff of Canterbury (Councillor W. P. Pierce) and Mrs. Gardiner, J.P.

Provisional Programme.

Friday evening: Interkonatiĝa Vespero.

Saturday morning: Visits in Canterbury. Saturday afternoon: B.E.A. Annual Meeting. Saturday evening: Pageant of Canterbury History in Esperanto. (There will be six scenes each containing 5-10 characters. Groups or Federations which will undertake to present a scene, should communicate at once with Mr. C. C. Goldsmith).

Sunday morning: Diservo. 1 p m.: Congress Lunch. Sunday evening: Concert and speeches by foreign Esperantists.

Monday: Excursion. Monday evening: Ball.

Tickets, price 3/6, are now ready. Already 52 have joined the Congress. Those who can should join at once. This not only provides the funds necessary for preliminary expenses, but also helps the Committee to gauge the amount of accommodation likely to be required.

Accommodation.

Full details will be on the "aliĝilo" which will be sent out in January or February, but it can now be stated that this will be available at from 5/- per bed and breakfast.

Kongresanoj (11-52).

B. E. Long, C. A. Fairman, C. C. Goldsmith, S-ino W. O. Bishop, W. O. Bishop, F-ino W. E. Carter, F-ino A. E. Baxter, S-ino E. M. Kendrick, F-ino C. O. Taylor, T. J. Gueritte, J. H. Pudney, Col. Robinson, S-ino Robinson, F-ino N. Ford, F-ino E. R. Mitchell, S-ro Phillimore, F. O. Lechmere-Oertel, R. Tucker, S-ino E. Simpson, F-ino E. Paintin, S-ino M. E. Emms, F. B. Elwell, W. Harvey, S-ino Gillett, T. L. C. Bluett, S-ino A. G. Trump, H. Trump, F-ino J. M. Trump, H. Nicol, L. Mason, C. E. Jacklin, S-ino E. E. Jacklin, F-ino A. Hamel, F-ino F. M. Bartholomew, C. D. Baxandall, F-ino Fortey, E. F. Dean, C. Steel, F-ino A. Evans. Cecil C. Goldsmith, 142, High Holborn, London, W.C.1.

Cecil C. Goldsmith, 142, High Holborn, London, W.C.1. Alfred G. Tucker, 8, St. Lawrence Villas, Canterbury.

Joint Hon. Secretaries.

LA ORIGINALA VERKARO DE D-RO ZAMENHOF.

(El letero de F. Hirt & Sohn).

Kio estas pli komprenebla kaj natura, ol ke la Esperantistoj deziru konatiĝi kun la verkinto de nia lingvo kiel eble plej intime. La plejmulto, kaj precipe la tute nova generacio, konas lin plejparte nur kiel tradukiston, ne kiel verkiston de originala prozo. Eble oni konas lin el liaj paroladoj kaj el liaj malmultaj originalaj poemoj. Sed D-ro Zamenhof skribis multajn artikolojn, leterojn kaj aliajn originalaĵojn, kiuj estas fonto malfacile alirebla, ĉar nur treege malmultaj posedas la jarkolektojn de la gazetoj, por kiuj li skribis. Kelkaj el la unuaj gazetoj hodiaŭ estas tiom maloftaj, ke laŭ nia scio, ekzemple, kompleta kolekto de lia unua gazeto La Esperantisto nuntempe en Germanujo ne ekzistas.

Prof. D-ro Dietterle, la direkto de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko, klopodis kolekti ĉion, kion D-ro Zamenhof verkis en originala prozo, kaj sukcesis prezenti la materialon tiel kompletan, kiel oni povas kolekti ĝin sub la hodiaŭaj cirkonstancoj. Lia kolekto montras la tutan bildon de la Majstro, paroligante lin mem de la tempo de la unua broŝuro ĝis lia morto. Li faris tre dankindan laboron, kiun fari estis jam tre urĝe; ĉar bedaŭrinde, ju pli preterpasis la tempo, des pli la Zamenhofaĵoj perdiĝis.

La libro "Originala Verkaro de D-ro Zamenhof"

montras la Majstron en lia evoluo, liajn pensojn, liajn proponojn kaj ideojn pri organizo kaj pri la evoluo de la lingvo, liajn juĝojn pri ĉiuj okazintaĵoj en Esperantujo, liajn esperojn, liajn suferojn.

Gesamideanoj. Zorgu pri la memoro de nia neforgesebla Majstro. Enrigardu pli profunden en la animon de tiu homo, kiu kreis tiel grandan movadon, kiel nia! En la tuta Esperanta literaturo vi trovos preskaŭ nenion pri la Zamenhofa ideologio. Tian specialan studon li meritas kiel unua Esperanta verkisto, kaj lia "Originala Verkaro" faciligos al vi tian enrigardon, tian studadon. Ĝi estos necesa verko por ĉiu serioza Esperantisto; por ĉiu instruisto kaj kursgvidanto; por ĉiu, kiu science volas pritrakti nian historion; por ĉiu grupo; por ĉiu biblioteko.

Kun ĝojo ni sciigas, ke ni prenos sur nin la eldonon de tiu plej urĝe bezonata verko. Tamen por la eldonado ni bezonas vin ĉiujn! Montru al ni per antaŭmendo senprokraste farita, ke vi havas intereson al tiu grava verko, kiu nepre devas troviĝi en la unua loko de ĉiu biblioteko. Atentu, ni petas, ke ni nun ne bezonas vian monon, sed nur vian antaŭmendon. Por povi komenci la eldonon ni bezonas ĝis la 30 Januaro, 1929, plej malfrue, antaŭmendojn je 1000 ekzempleroj. La libro ampleksos, krom aldonotaj faksimilaĵoj de la unua Esperanta gazeto kaj originalaj leteroj, ĉirkaŭ 500 paĝojn, formato, 14.5 x 22.5 cm. Papero, kaj cetere la tuta ekipo, estos unuarangaj, indaj je la grava kaj interesega verko. Gia proksimuma prezo estos-se la eldonkostoj en la monato de la apero restos la samaj kiel nun-12ŝ. Se via mendo atingos nin ĝis la 30 Januaro, 1929, ni kalkulos al vi por ĉiu mendita ekzemplero antaŭmendan prezon de 9ŝ. (respektive 25% sub la oficiala vendoprezo, fiksota ĉe la apero). La transsendo-kostojn ni ne kalkulos.

Do, ebligu la eldonadon per tuja mendo! Montru al la eldonejo, ke via intereso pri bona Esperanto-libro ne mortis, kaj ke tiu ĉi verko havas por vi plej altan valoron! La decido pri apero de la Originala Verkaro de Zamenhof estas en via mano. Montru vian fidelecon al nia Majstro per senprokrasta antaŭmendo de la verko. ĉe la B.E.A. Ne forgesu! Ne lasu la aferon al aliaj! MENDU NUN!

B.E.A. FESTENO.

Cent membroj kaj amikoj ĉeestis la festenon de 8 Decembro en la Hotelo Bonnington, London. Respekte al la memoro de D-ro J. C. O'Connor kaj kiel signon de bedaŭro pri lia forpaso, oni dum kelka tempo silente S-roj J. T. Holmes kaj R. Robertson per spritoplenaj paroloj tostis respektive la Asocion kaj la Prezidanton. Ni aŭdis, ke S-ro Merchant elektiĝis Prezidanto de la Internacia Centra Komitato pro tio, ke li estas la "P.I.C.K. of the bunch"! S-ro Merchant respondis laŭ sia neimitebla maniero. Sekvis inspira saluto farita de germana vizitanto, S-ro Senft. Al S-ro Fairman, kiel signon de danko kaj estimo kaj de bondeziro por lia estonta edza vivo, oni enmanigis edziĝdonacon de ĉeko. Per dancado kaj la bela kantado de S-ro H. W. Holmes, F-ino Munro, S-ro W. A. Gething, kaj S-ro H. Moy Thomas, tro rapide venis la fino al memorinda festo.

'Al la multaj amikoj, kiuj ne povis ĉeesti la festenon, mi deziras esprimi la sinceran dankon kiu elfluas el la koro pro iliaj bondeziroj kaj donaco okaze de mia edziĝo. Ĉio, kion mi faris por nia kara Esperanto estis amlaboro, kaj neniam mi pensis pri ia rekompenco. -C. A. Fairman, 21 Lebanon Rd., Croydon (provizora adreso)."

MOVADO FEDERACIA.

Lancashire and Cheshire. Skribu al F-ino A. Hurley, 38, Hilary St., Burnley, por detaloj pri Literatura Konkurso por Federacianoj por Arĝenta Krono.

East Midland. Konferenco en Mansfield (Kooperejo,

Clerkson St.), 12 Januaro.

Southern. La ekspozicio ĉe Portsmouth tre bone Oni vendis 360 paketojn da propagandiloj sukcesis. po 2p.

South Midland. Konferenco, Letchworth, 19 Januaro. 12 novaj membroj aliĝis al la grupo Luton pro la ĵusa. propaganda kunveno. Poŝtkartoj kaj fotoj de la alilandaj vizitintoj, po 4p. kaj 6p. respektive, ĉe S-ro W. A. Gething, 21 Durbar Rd., Luton.

West Midland. Konferenco en Bourneville, Jan. 19-20. Detalojn ĉe F-ino E. Prince, 84 Linden Road, Bourneville. Debatoj, koncertoj, Diservo, kaj aliaj bonaĵoj. Inkluziva bileto 6ŝ.

MOVADO GRUPA, KURSA, LOKA.

Plej koran dankesprimon mi sendas al la afablaj gesamideanoj en Bristol, Bath, Southport, Manchester, Liverpool, Birkenhead, Sheffield, London, Sibford, kaj Westcliff, kiuj tiel sindone kaj malavare agrabligis mian lastan paroladvojaĝon tra ilia ĉarma lando.

I. H. Krestanoff.

MOVADO FAKA.

Radio. La gazeto World Radio en Januaro komencos serion de artikoloj ĉiudusemajnaj-kredeble en la formo de lecionoj. Oni diskonigu ilin al siaj konatoj en la radiomondo.

Je Decembro 15 okazos du brodkastoj kun aparta intereso. (1) De Polskie Radjo (GMT 7.0) en pola lingvo pri Esperanto, kaj en Esperanto pri Polujo (kredeble de stacio Katowice, 10 kilovatoj 422 metroj. (2) De Komintern (1450 metroj) je 8.20 GMT kun plena programo en Esperanto Skribu gratulojn, kaj detalojn pri aŭdo, al Polskie Radjo, Str. Kredytowa, N.1., Warsaw, kaj al Poŝtkesto 701, Moscow (Centra Oficejo de Esperantistoj de Ligilo), respektive.

NASKIĜOJ.

Frerk. Al Ges. Frerk, 61 Effra Road, London, S.W.2, 27 Septembro, filo, nomita Lionel Clive Walter. Millidge. Al Ges. E. A. Millidge, High Salvington, filo, nomita Christopher Newnham.

EDZIĜO.

Bailey—Bury. Je 3 Oktobro, Akademiano William Bailey, el Manchester kaj Llandudno, al Ethel Bury.

MORTOJ.

Murgatroyd, 8-ino, mortis en Burnley, 82-jara, la 12an de Novembro. Si ĉeestis la Antverpenan Kongreson, kaj estis unu el la plej malnovaj kaj fervoraj Esperantistoj.

O'Connor, D-ro James Charles, ce Esperanto Villa, Faversham, je 28 Novembro, 75-jara. Li naskiĝis en Cork, kaj edukiĝis en Trinity College, Dublin; poste en Germanujo, kie li fariĝis Doktoro de Filozofio. Lia personeco estis malofta kombinaĵo de mensa precizeco kun riĉa imago kaj temperamento varma kaj larĝkora. Li estis genia instruisto, kaj en la fino de profesora kariero en Germanujo liaj germanaj studentoj portis lin sursultre. Ĉiu temo viviĝis je lia tuŝo. Li vojaĝis en multaj landoj, kaj havis interesojn tre diversflankajn. Li aliĝis al la Roma eklezio. La lastan duonon de sia vivo li dediĉis grandaparte al Esperanto, kaj ĉie paroladis kun apostola fervoro, gajnante por si la titolon, "la patro de Esperanto en la angleparolanta mondo." Lia lernolibro estis dum multaj jaroj preskaŭ la sola serioza instruilo por angle-parolantaj lernantoj; kaj li verkis aliajn librojn pli malgrandajn. Dum kelkaj jaroj li redaktis "La Esperanta Instruisto."

Sherris, F-ino Crace, el Clacton-on-Sea, pro pneŭmonio.

je 27 Julio.

VERKOJ RICEVITAJ.

Pri historio evoluado de moderna Japanujo kondukinta al la renovigo de imperiestra reĝimo en 1868. Ĉikao

Fuĵisava, 19pp. Neaĉetebla.

Prospekto pri la Leipziga Foiro, 3—13 Marto, 1929. 12-paĝa, lukse ilustrita, ĉe Leipziger Messamt, Esperanto-Fako, Markt. 4, Leipzig. Oni faras apartajn aranĝojn por la helpo kaj komforto de Esperantistoj. La Laborista Esperantismo. E. Lanti. 40pp.

Libera Voĉo. Vortoj de 21 kantoj. 32pp., 7p. Eldonis

Aŭstria Laborista Ligo Esperantista

Adresaro de Esperantistoj en Svedujo. 48pp. Prok-

simume mil adresoj.

*Coju Ni. Versoj kaj Prozo en Esperanto por komencantoj ĉiulandaj (kun ĉapitro pri gramatiko kaj vortfarado). J. J. Findlay, M.A., Ph.D. La teksto de la du gramofondiskoj Findlay-Gregg, kun klarigaj

notoj. 46pp., fleksebla tolo, 1ŝ.

Internacionalstenografio en ĉiuj kulturlingvoj.

Aldono por la Gvidilo en Esperanto: Parto I (Germana, Angla, Franca, Hispana, Itala, Pola, Rusa). Jam aperis libro pri Internacionalstenografio de Kunovski por la lingvo Esperanto. La sistemo laŭdire estas egale taŭga por skribi preskaŭ ĉiun lingvon: jen klarigoj por adapto al sep Eŭropaj. Alilingvaj libretoj sekvos. La klarigoj por ĉiu lingvo estas verkitaj en Esperanto. Prezo ne montrita; ĉe Instituto de Internacionalstenografio, 79 Friedenstr., Duisburg, Germanujo. La sistemo estas el la kutima germana kursiva tipo, sed kontraŭe je la aliaj, ĝi skribas la vokalojn suben kaj la konsonantojn supren.

*Esperanto kaj Radio. Walter Dühler, 39pp. Plena dokumentaro pri la rilatoj inter Esperanto kaj Radio ĝis Aprilo, 1928. Tre valora libro por propagandistoj.

6p.

*La Ekonomiaj Kaŭzoj de Milito kaj de Industria Malbonstato. Oficiala manifesto de la United Committee for the Taxation of Land Values. Trad. Oscar M. Wihl, B.A., LL.B. Interesa klarigo pri la instruoj de Henry George. 8pp., 2p.

Pri la Perforto, Milito, kaj Revolucio. Kolekto de ĉerpaĵoj el la verkoj de L. N. Tolstoj. Trad. Zahari Zahariev. 24pp., 2½p. afrankite, ĉe H. Runham

Brown, Abbey Road, Enfield, Middlesex.

Sankta Venoeslao. Patrono de Ĉeĥa Nacio. Lia vivo, martira morto, kaj gloro. 32pp., kun bildo, eldonita (kun Esperanta afiŝego) de Komitato por Festoj de Miljara Jubileo de S-ta Venceslao, Josefska 8, Praha III. Prezo ne montrita.

*Klari. Romano de Myriam Catalany. El franca lingvo tradukis Em. Robert. Tute rekomendinda. Ĝenas nur la stranga maniero skribi kelkajn proprajn nomojn kursivlitere, kio malbeligas la paĝon. Ankaŭ du tri vortoj, kiaj ekz. la uzo de prunelo anst. pupilo. 136pp., 1/2.

Mondpaco kaj ŝantuna demando. Multilustrita grandformata verko, 64pp. Ĝi prezentas de la ĉina vidpunkto fortan plendon kontraŭ la japana agado rilate al Ŝantuno, kaj ĝin ilustras per dokumentoj kaj bildoj. Prezo ne montrita. Notinda ekzemplo de la

uzo de Esperanto por politikaj celoj.

Studo pri magnezioksiklorida cemento per X-radio. Akva Vaporpremo de magnezioksiklorida cemento, kaj la stato de akvo en ĝi. La Malmoliĝo de magnezioksiklorida cemento, kaj la funkcio de libera akvo, kristalakvo, kaj adsorbita akvo. La Mekanismo de la hardiĝo kaj malmoliĝo de cemento. Metodoj akiri fortikan gipecementon. Diversaj komunikaĵoj al Scientific Papers of the Institute of Physical and Chemical Research, Komagome, Hongo, Tokyo, en la jaroj 1926 kaj 1928. S-ro T. Maeda. Prezoj ne montritaj. Gratulinda iniciativo pri la uzo de Esperanto por diskonigo de sciencaj esploroj.

*Montecatini; ĝiaj mineralakvoj kaj grotoj. Turista kaj komerca gvidlibreto. Tekstoj itala kaj Esperanta en paralelaj kolumnoj. 104pp., kun mapo, multilustrita, 1/9.

Books starred are stocked by the B.E.A. Postage extra. Others should be ordered not from the B.E.A., but from the address given.

VARIOUS.

La plej malforta punkto en la B.E.A. financoj estas la fakto, ke ĝis nun la reklamantoj en I.L. ne estas sufiĉe multaj. Ni demandas al vi: ĉu vi mem subtenas tiujn, kiuj reklamas?

Internacia Scienca Revuo, Jan. kaj Feb., 1906. Kiu povas liveri tiujn numerojn? Skribu al E.W., ĉe B.E.A. Chocolates. We have received a price list in Esperanto of confectionery manufactured by Tehdas-Osakeyhtio SERES, Karamela fabrikejo, Turku, Finland. Agentoj dezirataj.

B.E.A. LIBRARY.

The Librarian acknowledges with grateful thanks the receipt of gifts of money or material from Mrs. Gillett (£3:3:0); Mr. E. Wilcocks (4/6), Mrs. Sherris, Mrs. Merrick, and Mr. G. W. Wight.

Mr. G. W. Wight, of Edinburgh, has added a fine set of lantern slides of the Antwerp Congress to the B.E.A.

collection.

The British Esperanto Association (Inc.),
142 High Holborn, London, W.C. 1.
Official Notices.

CANDIDATES FOR MEMBERSHIP.

Anderson, S-ino Ethel M.
Brokenshire, Rev. Charles D.
Fillery, Ernest C.
Harris, Arthur F.
Harvey, F-ino Mary
Havell, William H. H.
Hayes, F-ino Dulcie F. E.
Hoskins, Ralph E.
Jarvis, J. W.
Lodge, Sir Oliver
Rowe, Herbert
Willott, William

Erdington, Birmingham Michigan, U.S.A.
Southend-on-sea près Bougie, Algeria Rye
Stratford, London
Paddington, London
Clapham, London
Stapleford.
Salisbury
Barnsley
Rochdale

NEW DELEGATE COUNCILLOR.

Bethnal Green. Leonard R. Scrivener.
Grimsby, R. J. Yarworth
Portsmouth, W. H. Bow

DONATIONS TO B.E.A. (November, 1928).

General Funds: Miss L. Swan, 5/-.

Capital (50,000 Shilling) Fund: Esperantisto 8820 (in commemoration of 25 years' membership of the movement) 500; S. R. Marks, 1

John Merchant, 50; Anon, 10.

Very heartiest thanks to all.

M. C. BUTLER, Secretary.

PASSED PRELIMINARY EXAMINATION.

*John Gardiner, Belfast; Mrs. Rachel Porteous, Glasgow.

*Denotes that candidate has passed with distinction.

WM. HARVEY, Hon. Sec., Examination Committee.

24th Nov., 1928.